

Septembra

GEO MILEV



GEO MILEV

SEPTEMBRO

POEMO

DUA REVIZIITA ELDONO

El la bulgara lingvo tradukis:

H. M. HRIMA

DAVID SASONOV

SOFIO 1946

Bulgara Esperantista Kooperativo, Graf Ignatiev 2

GEO MILEV — VIVO KAJ VERKARO

Geo Milev naskiĝis la 15-an de Januaro 1894 en vilaĝo Radnevo, regiono de Stara Zagora (Suda Bulgario), kie liaj gepatroj estis unuagradaj ĝeinstruistoj. Pli malfrue lia patro estiĝis librovendisto en Stara Zagora. En la kultura medio de tiu ĉi urbo Geo Milev kreskis kaj absolvis gimnazion. Unue li studis literaturon en la Sofia universitato kaj poste en Leipzig, kie li ankaŭ frekventis lekciojn de filozofio, psikologio kaj teatra arto. Li estis vera poligloto kaj posedis preskaŭ ĉiujn eŭropajn lingvojn. Kiel oficiro en la bulgara armeo Milev partoprenis la unuan mondmiliton. La 29-an de Aprilo 1916 li estis serioze vundita ĉe la kapo kaj perdis unu okulon.



Post la fino de la milito Geo Milev komencis febran literaturan vivon. Li tradukis literaturaĵojn de la grandaj rusaj, francaj, anglaj, germanaj kaj svedaj verkistoj, redaktis la revuon „Vezni“ (Pesiloj), organon de la bulgaraj modernaj poetoj, kiu aperadis dum 3 jaroj (1919—1922). En la sama tempo Geo Milev

eldonis du kolektojn da versaĵoj: „La kruela ringo“ (1920) kaj „La ikonoj dormas“ (1922). Li verkis ankaŭ la libron „Funebra meso pri poeto P. K. Javorov“ (1922).

Geo Milev redaktis ankoraŭ la librojn: „Almanako Vezni“, „Antologio de la flava rozo“, en kiu estas kolektitaj unuj el la plej belaj lirikaj verkaĵoj el la mondliteraturo. Li ankaŭ kolektis materialojn por eldono de „Antologio de la ruĝa rozo“, kiun liaj edzino kaj filino eldonis en 1941. Geo Milev eldonis ankaŭ „Antologion de la bulgara poezio“, unu el la plej bone redaktitaj antologioj de la bulgara poezio.

En 1921 aperis lia broŝuro „La teatra arto“, kiu, prilaborita, reaperis en 1942. Kiel reĝisoro li metis sur la scenejon la dramon de Aŭgusto Strindberg „Morta danco“ kaj de Ernst Toller „Amaso-homo“, per kio montriĝis kiel homo kun granda ĝenerala kaj teatra kulturo.

Post la ĉesigo de „Vezni“ (1922) ĝis la Septembro ribelo (1923) en la animo de Geo Milev ekestis ŝanĝiĝo. La transiron de simbolismo kaj modernismo al sociala poezio Geo Milev travivis tiamaniere, ke li aperas antaŭ ni kiel unu el la plej interesaj personoj en la bulgara literaturo.

Dum Januaro 1924 Geo Milev komencis redakti, kune kun D. T. Straŝimirov, Ĥristo Jasenov k. a., la revuon „Plamâk“ (Flamo), kiu estis malpermesita de la polico dum Januaro 1925 pro ĝia revolucia karaktero. En ĝi aperis „Malbelaj prozoj“, en kiuj la aŭtoro parolas pri la morto de Rosa Luxemburg kaj Karl Liebknecht. La poeto kuraĝe, malkaŝe parolas kontraŭ la reakcio — en la politika, socia kaj kultura vivo — reganta ĉe ni post la 9-a de Junio 1923 (kiam oni renversis la demokratan regadon de Al. Stambolijski)

kaj precipe post la Septembra ribelo en 1923 (kiam la bulgara popolo, gvidata de la Komunista partio, ribelis, sed la ribelo estis kruele subpremita de la reakcio). En „Plamâk“ aperis ankaŭ la poemo „Septembro“. La celo de la aŭtoro estas prikanti la heroan Septembran ribelon de 1923. Ĝi estas lia plej bela poezia kaj revolucia verko, kiu faris lin senmorta en nia kaj en la tutmonda literaturo. Pro ĝi la reakcia tribunalo kondamnis la poeton je unu jaro da malliberejo kaj monpuno. Krom tio la poemo estis konfiskita, sed ĝi kaŝe estis disvastigata kaj legata kiel vera evangelio. La poemo estis tradukita en rusan, rumanan, esperantan kaj parte en germanan lingvojn.

La plej granda signifo de la poemo estas la fakto, ke per ĝi la aŭtoro protestis kontraŭ la sanga masakro de la reakcio en la malhelaj tagoj de 1924—1925.

Sed tiam ankaŭ la reakciaj rondoj ne dormis. La polico kaŝe observis la kuraĝan verkiston. Venis la atenco en la katedralo Sveta Nedelja (Sankta Dimanĉo) dum Aprilo 1925. Tiukaze estis mortigitaj multaj sindonaj batalantoj por popola libero. Tiam malaperis sen iuj ajn postsignoj la multkapabla ĵurnalisto Josif Herbst, la vilaĝa poeto Sergej Rumjancev (Dimitr Dilovski), la simbolisto kaj komunisto Ĥristo Jasenov.

Senpostsigne malaperis ankaŭ en la sama tempo la plej entuziasmoplena kaj verva poeto Geo Milev. La 15-an de Majo 1925 antaŭ vesperiĝo unu polica agente venis en lian domon, prenis kun si la senkompromisan poeton kaj de tiam ĝis hodiaŭ liaj postsignoj perdiĝas. Ekzistas onidiroj pri kruela morto,

pri bruligo en la forno de la Direkcio de l' polico,
pri pafmortigo, sed kie kaj kiam — neniuj scias.

Geo Milev mortis, sed li restis kiel standardo
por la popolo kaj por la junularo, ĉar li vere estis
kuraĝa batalanto, honorinda civitano kaj talenta
poeto.

Ivan Sarafov

Sofio, Decembro 1946.

1.

*La nokt' naskas el morta interno
de l' sklavo indignon eternan:
ĝian ruĝkoleron protestan —
majestan.*

En mez' de mallum' kaj nebulo.

*El valoj malhelaj
— jam antaŭ krepusko
el tuta montaro
el densaj arbaroj
el kampoj senfruktaj
el kotaj urbetoj
vilaĝoj
kaj urboj
el kortoj
kabanoj
el la fabrikoj, tenejoj, stacidomoj
grenejoj
farmbienoj
muelejoj
laborejoj
uzinoj
minejoj:
sur vojoj kaj vojkurbiĝoj
alte
sur ŝtonoj, krutaĵoj, rokoj kaj suproj
kamplimoj*

kaj muroj,
tra valoj sensunaj
tra flavaj arbaroj aŭtunaj
tra ŝtonamasoj
akvaroj
torentoj
herbejoj
ĝardenoj
grenkampoj
vinberejoj
ripozejoj ŝafaj
dornejoj
forbrulintaj stoplaroj
pruneloj
kaj marĉoj:
ĉifonvestaj
malpuraj
malsataj
malserenaj
malgrasaj pro ekspluato
krudaj pro varmo kaj frosto
degenerintaj
kriplaj
vilharaj
mizeraĵ
nudpiedaj
nigraj
simpluloj
sovaĝuloj
koleraĵ
rablantaĵ

— sen rozoj
kaj kantoj

*sen muziko kaj tamburoj
sen klarnetoj, timpanoj kaj gurdoj
kornoj, trombonoj, trumpetoj:*

*sur la dorsoj kun ĉifonaj saketoj
en manoj — ne spadoj gracilaj,
sed vergoj senbrilaj
kamparanoj kun stangoj
kun bastonoj
kun fosiloj
kun ŝovelliloj
kun forkoj por fojno
kun kojnoj
kun hakiloj
kun falĉiloj
kaj sunfloroj*

*— junaj kaj maljunaj —
alkuris el ĉiu angul'
simile al grego
da bestoj senvidaj —
multego
da fortaj virbovoj —
kun hurloj
kun muĝ'
(post ili — la nokta senmova kupol')
atakis kun fort'
sen ord'*

*nedeteneblaj
minacaj
kaj grandaj:
Popol'!*

2.

*Disversigis la nokto en briloj
sur montosuprar'.*

Al suno

direktis rigardon sunfloroj!

El dormo aŭroro

vekiĝis

ĉe l' hurlo de maŝinpafiloj:

De la malproksimaj

deklivoj

— unu post la alia —

ekvipis

frenezaj

kugloj de plumbo.

Kanonoj —

elefantoj koleraĵ —

ektondris...

Teruro kaj trem',

En polvon falis sunfloroj en sven'.

3.

Voĉ' popola:

Voĉ' dia.

Per miloj da sabroj

borita

popol' —

premita

batita —

pli stulta ol besto,

restinta

sen cerbo

sen nervoj —

riĉelis
en nokto alarma
de sia vivaĉ'
— *kaj skribis per sia ruĝsango:*
Libera!

Unua ĉapitro

***SEPTEMBRO*¹**

— *Voĉ' popola* —
= *Voĉ' dia* —
Ho dio!
subtenu la sanktan aferon
de l' kruda kaj nigra manpar':
kuraĝon
en koron vi verŝu sen ŝpar:
neniun deziras vi sklav' —
kaj jen — ni ĵuras je nia tomba kav' —
ke l' homon revivigos ni
libera en la mond'.
Antaŭstaras nin mort' —
ĝi staru!
Sed transe:
Hanaan' tie floras
de l' ver' promesita
al ni —
eterna printemp' de l' vivorev'...
Ni kredas! Ni scias! Ni deziras ĝin!
Kun ni estas Dio!

4.

Septembro! Septembro!
Ho sanga monat'!
De supreniro
kaj disromp'!
Unua ribelis Mâglij²
Stara
kaj
Nova Zagora²
Ĝirpan'
Lom'
Ferdinand'
Berkovica
Sarambej²
Meakovec
(kun pop' Andreo³)
— vilaĝoj kaj urboj.

5.

Popolo ribelis —
kun martelo
en mano,
kovrita de fulgo fajreroj, skorio,
— kun rikoltilo surkampe,
trasorbita de frosto kaj pluvo:
homoj de l' nigra laboro
kun senesprima pacienco —
(ne viroj de l' scienco
talentuloj
protestantoj
oratoroj
agitistoj

fabrikmastroj
pilotoj
pedantoj
verkistoj
generaloj
posedantoj
de drinkhaloj
muzikistoj
kaj reakciuloj)

Sed

kampuloj
laboristoj
krudaj simpluloj
senbienaj
malkleraj
mizeraĵ
almozuloj
viraproj
— bestsimila
multmila

amaso

popol' :

Miloj da kredoj
— kred' je popola leviĝ',
miloj da voloĵ
— volo je vivoŝeliĉ',
miloj da koroj sovaĝaj
— kaj en ĉiu kor' flamo,
miloj da nigraj manoj
en rondo ruĝa de l' vasto,
levantaj impete supren
purpurajn
standardojn



flirtantajn
alte
senhalte
super la tuta en trem' kaj tumulto skuata patrio:
frukto de ŝtorma rabio:
Miloj —
amaso —
popol'.

6.

Super
la hejmaj montaroj,
leviĝantaj
ĝis blua ĉielo
kaj suno eterna
fulmo
— tondro
frapis
rekte en koron.
de l' giganta,
centjara
kverk'.
La montetoj
foren transsendis
eĥon facilflugan
tra rokoj
ŝtonamasoj
al valoj malebenaj
al ŝtonaj kavernoj
— flamanta interno
en rond' kie dormas
viperoj, kolubroj,
en neston

*de gedrakoj
en mutajn sorĉinajn kabanojn
— — kaj tondro kuniĝis
kun fora reson':
La bruo kaj fluo
de l' akvofaloj
torentoj
pluvondoj
rabie
falantaj abismen
kun muĝo.*

7.

Komencas jam la tragedio!

8.

*L' unuaj
falas en sango.*

*Ekelon ribelan
oni renkontis per kugloj.
Kliniĝis standardoj
kugloboritaj.
Tondras montaro...
Jen supre
montetoj proksimaj kaj foraj
nigriĝis de homaj figuroj
— rampis
nigraj kolonoj:⁴
regulaj dungsoldatoj
kaj furioza milico — —
Ili nur scias:
„La patrio*

estas en danĝero!"

Bonege:

sed — kio estas patrio? —

*Kaj hurlas rabie
la maŝinpafiloj...*

*La unuaj
falas en sango.*

*Trans malproksimaj
montpintoj
artilerio ektondris.*

*Timo ekmordis
vllaĝojn
kaj urbojn.*

*Korpoj mortaj
— sangaj kadavroj —
surkovris*

*deklivojn
remparojn
kaj vojojn — —*

*Kun elingitaj sabroj
kavaleritaĉmentoj persekutis
kamparanojn venkitajn
finmortigataj, pafataj
per ŝrapneloj, kartoĉoj
— terurigite fugantaj en diversajn direktojn,
atingataj en la domojn
kaj tie dishakataj
per sangaj sabroj
uub remizo malalta
oĉe plrego senhalta
de terurigitaj maljunulinoj
infanoj kaj virinoj...*

9.

Soldatoj atakis.

*Sub sonaĉ' de ŝrapnetoj sovaĝaj
tim' enbrakis
eĉ la plej kuraĝajn:
En malespero
sin levas nudbrakoj ĉielen.
Teruro sen gloro
ekkaptis ĉies vizaĝon —
okulparo sen suferesprimo.*

*„Ĉiu
savu
sian vivon!“*

*Laŭ ĉiuj vojetoj
moviĝas jen roto post roto
— infanterio
kavalerio
artilerio.
Tamburoj
krias atakon.
Paniko.
— Pli alte
ol flagoj purpuraj
de kugloj truitaj —
flamoj ruĝaj kirligas nun.*

*Tie
en tumulto senĉesa
sola,
frenezosimila
kuraĝulo epopea*

pop'
Andreo³
per legenda kanono
pafas
kartoĉojn sen plend' —
En lasta moment':
„Morton al satano!“
li kriis
furioza kaj granda —
kaj kanonon sian
turnis malantaŭen:
last-ŝrapnelon
ekcelis
en templon
de Dio —
kie li iam liturgiis...

Kaj kapitulacis.
„Popon ruĝan pendigu tuj oni!
Sen kruco — sen tombo!“

Ĉe fosto telegrafa pendigis lin oni.
Ĉe li pendigisto.

Kapitano.

La ŝnuro
estis preta.

Balkano⁵
mallumis kolera.

Ĉleio —
malserena.

La popo elstaris majesta
kun sia impona statur'
tuta
trankvila kiel granit' —
sen bedaŭro

sen rememoro

*— surbruste la kruc' de Jesuo
rigardante fikse la montaron —
malproksimen*

kvazaŭ la estonton...

*— Vi timeme deturnas rigardon
antaŭ mia baldaŭa morto,
murdistoj!*

*Kion signifas
mia morto?*

Amen!

Kraĉaĵon

li ĵetis.

Tuj metis

*sur kolon sian la ŝnuron
kaj*

nerigardante lazuron

— ekpendis —

langon

premante per dentoj:

granda

sublima

senkompara!

10.

Aŭtuno

forflugis

sovaĝe ŝirita

en ĝemoj, turnvento kaj nokt'.

Alvenis tempest'

super montojn malserenajn

malhelo kaj ekbrilo

kaj svarmo da korvoj grakantaj.

*Sanga ŝvito
eliris sur dorson de l' tero.
Alteriĝis en tremo, timgest'
ĉiu kabano kaj dom'*

Pogrom' !

*Tondro
fendis la volbon ĉielan.*

11.

*Kaj tiam ekestis
la pleja terur' *
Rabi-obsedite
alarm-sonorilo animojn ekfrapis
— sonbatas, sonoras...
Nokto falas malalten —
timige, silente ŝlosita
de ĉiuj flankoj.
La morto
— sorĉistino kun sangapetito
kaŝanta sin en ĉiuj anguloj mallumaj
plorkrias
kaj palpas
malproksimen kaj ĉie en nokto:
per sia longa brakparo
— longa, senfina —
ĝi kaptas, sufokas
post ĉiu dommuro
po unu kor' en teruro.
Ho nokt' de sekretoj sennomaj
— konataj kaj nekonataj:
Per karmin' koloriĝis la stratoj denove.
Mortkrioj, en gorg' tratanĉita, balbutas senpove.
Prizonoj homplenaj ĝis pord'.*

En kort'
de kazernoj, arestejoj
la eho de salvoj aŭdiĝas.
La pordoj riglitaj.
Frapas dompordojn figastoj.
En man' kun revolvero la filo
sur la sojlo sternita.
La patro pendigita.
Seksperfortita la fratino.
For de l' vilaĝoj estis homoj trenataj —
sekvis soldatoj ilin:
ekskort' de l' mort'.
Por mortpafo
sonis komando: Halt'!
„Fajron!“

Klakis pafiloj:

Ku

Kluks

Klan' —

„Pafu!“

— Salvo.

Dek kadavroj
de bordrando
falas kun bruo
en mortan kotakvon de Marica.^s
Sango flua
fortrenis ilin patrino-rivero.
En malproksimo muziko milita
tra stratoj senhomigitaj
tondris:
„Ŝaŭmas Marica
sange kolora...“⁹
Sur grenkampoj ebenaj
dornplenaj

inter herbo kaj pruneloj
kapoj kuŝis forhakitaj
kun senformaj vizaĝoj.
Pendigiloj etendis la brakojn
(fantomsimilaj en morta nebulo).
Senĉese ŝvebas la timiga marŝ' de l' hakilo,
frapinta je osto. Vilaĝoj en brulo
firmamenton heligis per brilo.
Ekkuris sangaj torentoj.
Flamantaj ŝtiparoj
per lango profana eklekis
fundamenton radian
de dia
ortron'.
Homkarna odoro ekŝvebis.
Terurigite, de alto ĉiela
aŭdigis krion
paradizanoj beataj sen lim':
— al Dio kruela Osianna¹⁰ —

Fin'.

Uragano forpasis.
La ŝtormo
ĉesis finfine:
paco
kaj trankvilo
ekestis
sur tuta
lando.
La sanga ofero de l' dioj.

Muzo, prikantu tiun pereigan koleron de Aĥileso...

Aĥiles' havis forton nur krudan. —

Milita demono.

*Aĥiles' estis fidelgeneralo
de reĝmoŝto Agamemnono.*

Aĥiles' estis heroo

kun tro

da krucoj, ordenoj...

Piedestal'

de ordo kaj trankvilo

enlanda...

Hodiaŭ ni tamen ne kredas

la heroojn

— nek niajn, nek fremdajn.

Trojo estis bruligita kaj ruinigita.

Priam kaj Hekuba pereis...

Aĥiles' jubilas...

— Hekuba neniom signifas

por lia anim' sangsoifa.

Trankvilas li ĉe plor'

de l' sankta patrino, disŝirata

sur sennombra tombaro sangaspergita

— rapide estiĝintaj —

tiom multaj —

sennombraj.

Hekuba nenion signifas

por Aĥiles' la hero'

por Aĥiles' granda tro.

Plago sendita de Dio!

Sed pereos Ahiles' sub koler' kaj malbenoj!

— Kaj pereis —

*li falis per morto malglora:
al murdisto repago plej justa.*

Agamemnon' murdis Ifigenion

— kaj pereis.

Klitemnestra murdis Agamemnonon

— kaj pereis.

Orest' kun Elektra murdis Klitemnestran

— kaj pereis...

Restas solsola

— eterne vivanta

tra la jarcentoj —

profetino Kasandra;

Ŝi aŭguras repagon

kaj ĝi realiĝas.

*Kapric' neŝanĝebla, ludo kaj amuzo
de l' dioj.*

*Pro l' eterne kreskanta dieca avid'
ĉiu mort' ilin amuzas senĝene.*

Estas ŝerco — ĝemo ĉia.

Morto, murdo kaj sang'!

Sed ĝis kiam, ĝis kiam?

Ĉiopova vl Zeŭso

Jupitro

Ahuramazdo

Indra

Tot

Ra

Jehovo

Sabaot:

— Respondu!

Tra la fum' de l' brulegoj

por ataki ĉielon sin levas
de l' murditoj la krio,
la ĝem'
de sennombraj martiroj
sur brulanta ŝtipar' en mortprem'.
— kiu
trompis nian kredon?

Respondu!
Vi silentas?
Ne scias?
— Ni scias!
Vidu do:
per saltego
ni rekte atingas la ĉielon:

For Dion!

— per bomb' vian koron ni ŝiras,
atake ĉielon konkeras:

For Dion!

Kaj de via tron'
ni forĵetas vin morta malsupren
al profund' universa
senstela
malhela —

For Dion!

Tra la pontoj ĉielaj
altegaj sen fin'
per ŝnuroj kaj ferstangoj
ni portos la belparadizon
malsupren
sur la ĉagrenan

*plenplenan je sango
terglobon.*

*Ĉiuj profetaĵoj de filozofoj, poetoj —
realiĝos!*

Sen dio! sen mastroj!

Septembro estiĝos Maj'.

La homa viv'

estos senhalta suprenir'!

— Nur supren! Nur supren!

Edeno ekestos sur ter'! —

ekestos!

KLARIGAJ NOTOJ

¹ La 23-an de Septembro 1923 eksplodis en diversaj lokoj de Bulgario, sed precipe en Nordokcidenta Bulgario, kun centro Mihajlovgrad (estinta Ferdinand), ribelo kontraŭ la faŝisma reĝimo de Aleksandro Cankov. La lasta organizis puĉon (ŝtatan perforton), per kiu renversis la 9-an de Junio 1923 la demokratian reĝimon de Aleksandro Stambolijski, gvidanto de la agrara partio. Per la helpo de la armeo la puĉo sukcesis. En la lando ekestis reakcio. La popolo malkontentis kaj ribelis. La Septembran ribelon gvidis la Komunista partio kun siaj ĉefoj Georgi Dimitrov kaj Vasil Kolarov. La ribelo ne sukcesis kaj estis kruele subpremita de la reakcio. Multaj komunistoj kaj agraranoj estis malliberigitaj, multaj — mortigitaj, aliaj — elmigris. Post 21 jaroj, la 9-an de Septembro 1944, la faŝismo en Bulgario estis venkita kun la helpo de la nevenkebla ruĝa armeo. La sorto de la popolo nun troviĝas en ĝiaj propraj manoj. Septembro vere estiĝis Majo.

² Magliĵ estas vilaĝo en Kazanlika regiono, proksime ĉe Stara Zagora.

Stara Zagora kaj Nova Zagora — urboj en Suda Bulgario
Sarambej (aŭ Saranevo) — stacio sur la internacia fervojo Sofio—Konstantinoplo.

³ Popo Andreo Ignatov el vilaĝo Medkovec, regiono de Mihajlovgrad, estas konkreta heroo en la poemo. Post la subpremo de la ribelo popo Andreo estis pendigita sur unu telegrafa fosto.

⁴ Nigraj kolonoj — kontraŭrevoluciaj bandoj, nomitaj en bulgara lingvo „ŝpikomandi“, kiuj faris nepriskribeblajn terurojn kaj mortigojn de ĉ. 30,000 ribelintoj kaj pacaj civitanoj.

⁵ Balkano — la plej longa montaro en Bulgario, ludis gravan rolon en la historia vivo de la bulgaroj. En la montaro kaŝiĝis la batalantoj kontraŭ la turkaj kruelaĵoj dum la jugo. En ĝi rifuĝis la ribelintoj dum Septembro 1923. En ĝi kaŝis sin la partizanoj de la rezista movado dum 1941—1944.

⁶ La teruro en la tuta lando estis grandega. Miloj da civitanoj estis malliberigitaj, miloj estis fororbitaj, miloj estis mortigitaj senindulge sen ia kulpo, nur pro ia suspekto. La faŝistaj armitaj bandoj vagis tra la tuta lando, persekutis la civitanojn, mortigadis senĉese. Tio daŭris monatojn, jarojn, longe post la ribelo. La teruro pendis super la tuta lando kiel malhela nuboj.

⁷ Ku—Kluks—Klan estas faŝista organizaĵo en Usono.

⁸ En la koton de Marica estis enterigita Aleksandro Stambolijski, mortigita de la faŝistoj, proksime ĉe lia naskvilaĝo Slavovica, regiono de Pazarĝik.

⁹ Marica estas granda rivero en Suda Bulgario, kie estis mortigitaj de la turkoj dum la Aprila ribelo en 1876 miloj da bulgaroj. Pro tio en la bulgara nacia himno oni kantas: „Ŝaŭmas Marica sange kolora...”

¹⁰ Osianna — hebr. „donu savon”.



POSTPAROLO

En somero de 1930 mi kun David Sasonov tradukis „Septembro“-n kaj en 1931 ĝin eldonis EKRELO en Leipzig.

Pasis 16 jaroj.

Multon travivis la mondo dum tiu tempo. Nia liberama popolo, kiel multaj aliaj popoloj sur la terglobo, grave suferis sub la reĝimo de faŝista diktaturo kaj hitlerista okupado. Por sia liberiĝo nia popolo donis milojn da viktimoj, inter ili multaj esperantistoj. Pereis en ekzilo ankaŭ kamarado David Sasonov, la kuntradukinto de l' poemo.

Reeldonante „Septembro“-n, mi provis ĝustigi kelkajn lokojn de l' teksto. Sed mi evitis fari superfluaĵn korektojn, celante konservi senŝanĝa precipe la tekston, kiun esperantigis mia karmemora amiko.

Plovdiv, Septembro 1946.

H. M. Ĥrîma

SEPTEMBRO, POEMO DE GEO MI-
LEV. TRADUKIS Ĥ. M. HRIMA KAJ
DAVID SASONOV. PRESIGIS LA ES-
PERANTA PRESEJO BEPEGRAF, STR.
OPALĈENSKA 69—SOFIO, DUM DE-
CEMBRO 1946. ELDONIS BULGARA
ESPERANTISTA KOOPERATIVO EN
2000 EKZ. LIVERAS BULGARA ES-
PERANTISTA ASOCIO, STR. GRAF
IGNATIFV 2, SOFIO — BULGARIO.
PORTRETO KAJ ILUSTRAĴO: AL.
STAMENOV. KOVRILO: M. MINĈEV.